

# BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO  
№ 101, Februaro 2019



## *Estraro de REU decidas*

RUSIA ESPERANTISTA UNIO  
PROTOKOLO № 17 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 07.02.2019

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Pri la "Membreco kaj kotizoj en REU".

DECIDO

Akcepti la Regularon "Membreco kaj kotizoj en REU" (Propono de A. Lebedev) inkluzive de la kotizotabelo de REU por la agadjaro 2019.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 6 ;

kontraŭ: 0 ;

sin detenis: 0 .

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

## Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU

(akceptita de la Estraro de REU 07.02.2019)

Tiu ĉi regularo baziĝas sur la Statuto de REU kaj la Ĝenerala Regularo de REU, konkretigas kaj kompletigas iliajn tezojn koncerne la membrecon en REU.

### I. Membroj de REU, kandidatoj kaj amikoj de REU

1. Membroj de REU povas esti fizikaj personoj — atingintaj la 18-jaran aĝon civitanoj de Rusia Federacio aŭ alia ŝtato kaj personoj sen civitaneco, posedantaj, lernantaj aŭ subtenantaj la lingvon Esperanto kaj agnoskantaj la Statuton de REU.

2. Membroj de REU povas esti juraj personoj — ajnaj esperantistaj sociaj unuiĝoj, registritaj laŭ la ordo, fiksita de la Leĝo.

3. Ĉiuj membroj de REU ĝuas egalajn rajtojn:

- partopreni kun rajto de decida voĉo en la Konferenco de REU;
- elekti kaj esti elektitaj (havi elektitajn reprezentantojn) dum formado de la elektataj organoj de REU;
- partopreni en programoj kaj aranĝoj, organizataj de REU;
- turni sin kun demandoj kaj proponoj al la organoj kaj departementoj de REU, ricevi de ili helpon kaj konsilojn;
- uzi la havaĵon kaj la materialan bazon de REU;
- ricevi unuecmodelajn membrokartojn (juraj personoj — sociaj unuiĝoj — por siaj personaj membroj); la membrokartoj estas farataj elektronikforme;
- ĝustatempe ricevi informojn pri la planataj aranĝoj kaj decidoj de la organoj de REU.

4. Membro de REU ricevas elektronikforme Bultenon de REU, Jarlibron de REU, aliajn informojn. Laŭbezone la Estraro de REU povas sendi al membroj oficialajn dokumentojn per ordinara poŝto.

5. Membro de REU havas rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

6. Oni rajtas aliĝi por unu aŭ por kelkaj sinsekvaj jaroj, komencante de la kuranta jaro (la membreco validos ekde la dato de la kotizpago) aŭ de la sekva jaro (la membreco validos ekde la 1-a de januaro). Aliĝanto pagas respondan kvanton da kotizaj sumoj. Lia/ŝia jam pripagita membreco ne dependas de eventualaj postaj ŝanĝoj de la kotizoj.

La membreco validas ĝis la 31-a de decembro de la lasta pripagita jaro.

7. Persono, kiu pagis samtempe kotizon por 20 jaroj, iĝas dumviva membro de REU. Li/ŝi restas membro de REU dum la tuta vivo aŭ ĝis aparta decido de la Estraro en okazoj, kiam la persono estos agnoskata kiel «perdinta kontaktojn kun REU, sen eblo ekscii pri lia/ŝia vivo aŭ morto».

8. Kandidato por membreco estas persono 14–17-jaraĝa, kiu aprobas la statutajn celojn de REU, interesiĝas pri ĝia agado kaj subtenas ĝin, deklaras strebon post la atingo de la 18-jara aĝo iĝi membro de REU. Kandidato ricevas informmaterialojn de REU, havas ĉiujn listigitajn supre en la artikoloj 3–5 rajtojn de REU-membroj, krom la rajtoj voĉdoni kaj esti elektita en la organoj de REU.

9. Ĉiuj kandidatoj kaj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.
10. Amiko de REU estas fizika aŭ jura persono, kiu esprimas simpatiojn al REU. Amiko rajtas partopreni en programoj kaj aranĝoj, organizataj de REU kaj ricevi informmaterialojn de REU.
11. Novaj membroj de REU, kandidatoj kaj amikoj de REU devas komuniki informon pri si: minimume sian plenan nomon, loĝlokon, naskiĝdaton kaj validan retadreson.

## II. Membrokategorioj de REU

Membroj de REU disdiviĝas je sekvaj kategorioj:

1. Individua membro — fizika persono kun ĉiuj rajtoj, indikitaj en la artikoloj 3–5 de la parto I.
2. Aliĝinta kolektivo de REU — aro el minimume 5 personoj, kiuj kolektive aliĝas al REU kaj iĝas aligitaj membroj de REU. Aliĝinta kolektivo havas apartan paĝon en la paĝaro de REU kaj estas menciata en la membrolisto de REU. Aliĝinta kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio.
3. Aligita membro de REU (individua membro de aliĝinta kolektivo de REU) kun ĉiuj rajtoj, indikitaj en la artikoloj 3–5 de la parto I.
4. Membro-subtenanto — fizika aŭ jura persono kun ĉiuj rajtoj, indikitaj en la artikoloj 3–5 de la parto I, paganta pli altan kotizon, ol individua membro.
5. Dumviva membro de REU kun ĉiuj rajtoj, indikitaj en la artikoloj 3–5 de la parto I.



## III. Kotizoj en la agadjaro 2019

1. Kotizo de individua membro de REU — 250 rubloj (por ekster-KŜŜ-anoj — 20 eŭroj).
2. Kotizo de aliĝinta kolektivo de REU — aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de rea aliĝo — 300 rubloj. Ĝi estas unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas la kotizon. Se kolektivo ne pagas kotizojn por la aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.
3. Kotizo de aligita membro de REU — 200 rubloj por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj).
4. Membro-subtenanto de REU pagas ne malpli ol 2-oblon de la individua kotizo.
5. Dumviva membro de REU pagas la 20-oblon de la individua kotizo. Ekde la 1-a de januaro 2019 REU ne akceptas novajn dumvivajn membrojn dum tio ne estas ŝanĝita per speciala decido.
6. Kandidato — senkotiza aliĝo.
7. Amiko de REU — pagas kiel la kotizon ajnan sumon. Fizikaj personoj, ne atingintaj la 18-jaran aĝon, aliĝas kiel amikoj de REU senkotize.

## IV. Pagmanieroj

La pagmanieroj por rublaj kotizoj estas indikitaj en la paĝo [http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj\\_eo.html](http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj_eo.html). La eŭraj kotizoj sendendas al la UEA-konto «reua-p».

## AMoRU — la 2-a Tutrusia aktivula trejnado

Estimataj legantoj!

Tiuj ĉi rekomendoj estis aprobitaj de ĉiuj estraranoj de REU. Atentu, tamen, ke esperantistaj aranĝoj de AMoRU rajtas havi neniun rilaton al REU.

### Rekomendoj de la Estraro de REU al organizantoj de rusiaj esperantistaj aranĝoj pri la partopreno en la 2-a Tutrusia aktivula trejnado AMoRU-2019



Nuntempa rusia esperantista movado troviĝas en neaktiva stato. Malgraŭ regula paso de kelkaj aranĝoj, kolektantaj dekojn da esperantistoj, perdiĝis tradicio okazigi primovadajn seminariojn, ne ekzistas ankaŭ apartaj aktivulaj renkontiĝoj.

La tutrusia aktivul-maturiga trejnado sub la aŭspicio de UEA (AMo-44), pasinta februare 2018 en Apudmoskvo, konfirmis evidentan fakton: pro grandeco de la lando kaj multekosteco de vojkostoj ne eblas kunveni en unu loko reprezentantojn de ĉiuj ok rusiaj regionoj, aŭ almenaŭ de plimulto el tiuj, por kuna primovada seminario (trejnado).

Sperto de landaj AMo-seminarioj tra la mondo montras, ke ene de tiuj eblas ellabori ne multe utilajn ĝeneralajn rekomendojn por organizado de

esperantista movado, sed konkretajn strategiojn de agado por siaj loĝlokoj kapablas ellabori nur lokanoj. Tial okazigo de lokaj aktivulaj seminarioj (trejnadaj) estas pli celkonforma.

Lige kun supre dirita la Estraro de REU rekomendas eksperimente konsideri ĉiujn aktivulmaturigajn eventojn, okazantajn en la lando dum la 2019-a jaro, kiel eroj de unu aranĝo — la dua Rusia seminario pri aktivula maturigo (AMoRU–2019).

La Estraro de REU

1/ petas permeson de organizantoj de ĉiuj rusiaj Esperantaj aranĝoj konsideri kiel parton de AMoRU–2019 ĉiujn erojn de ties programoj, ligitaj kun organizo de la esperantista movado aŭ aktivula maturigo kaj menciitajn erojn en la komuna listo de eventoj de AMoRU–2019;

2/ rajtigas sin rekomendi al la organizantoj primovadajn programojn (seminariojn, trejnadajn, prelegojn) kun instrukcioj ĉe bezono pri ties gvidado; la organizantoj rajtas ne akcepti la rekomenditajn aranĝojn;

3/ petas la organizantojn aŭ iliajn komisiitojn liveri al la Estraro de REU koncernan dokumenton, se temas pri akceptitaj decidoj, rekomendoj aŭ diskutoj, gravaj por la evoluo de la esperantista movado landa, regiona aŭ loka;

4/ petas la organizantojn aŭ iliajn komisiitojn laŭeble prepari informmaterialon pri la okazintaĵo por eventuala publikigo en la oficiala paĝaro <http://reu.ru>, en la sociretaj grupoj VKontakte «Rusia Esperantista Unio (REU)» [https://vk.com/reu\\_vk](https://vk.com/reu_vk) kaj «Regiona agado» <https://vk.com/reago>; eble, ankaŭ en «Bulteno de REU».

Tiuj ĉi Rekomendoj estas publikigitaj en la oficiala paĝaro <http://reu.ru> kaj en la koncernaj sociretaj grupoj; ili estos sendotaj al organizantoj de ĉiuj amasaj esperantistaj aranĝoj, organizotaj en la lando dum la jaro 2019.

Komenti tiun ĉi tekston aŭ fari demandojn pri AMoRU vi povas en la koncerna pridiskuto en la VK-grupo de REU: [https://vk.com/topic-163508701\\_39204451](https://vk.com/topic-163508701_39204451)

*Rekomendoj estis preparitaj de Irina Gonĉarova, estrarano de REU pri regiona agado la 22-an de januaro 2019.*

## Renkontiĝoj

### NOVOJARSK-2019 — Siberia regiona novjara renkontiĝo de rusiaj esperantistoj



"Prosperu verda bastion' ĉe l' Ruĝa Ravino!" — estas vortoj el kanto de Mikaelo Bronŝtejn, kiun li dediĉis al Krasnojarska esperantista klubo, fluginte en la urbon en jam malproksimaj okdekaj jaroj. Pasis kelkdekaj da jaroj kaj Miĉjo denove venis Krasnojarskon kaj renkontiĝis kun malnovaj amikoj-samideanoj. Ĉu prosperas la verda bastiono? Kiel nun fartas iame junaj geamikoj? Kiel aspektas la urbo post multaj jaroj? Verŝajne samajn demandojn faris por si Irina Gonĉarova, kiun la krasnojarskanoj vidis la unuan kaj lastan fojon en la 1979-a jaro!... Kaj jen aperis kaŭzo por denove vidi unu la alian, manpremi kaj brakumi.

NOVOJARSK aperis antaŭ kvar jaroj kaj revenis en Krasnojarskon la duan fojon. Komenciĝinte kiel amika renkontiĝo de krasnojarskaj kaj

novosibirskaj esperantistoj, la trian fojon ĝi engaĝis ankaŭ tomskanojn kaj ĉe la kvara fojo reliefiĝis jam kiel plenrajta regiona esperantista aranĝo. La organizantoj de NOVOJARSK-4, konsiderante la spertojn de Novosibirska kaj Tomska kluboj, orientiĝis jam ne nur al distro-festa evento, sed ankaŭ al utila – klegiga kaj movada. La programon pripensis, kompilis kaj prizorgis la membroj de KRESKO-estraro, kiuj iĝis plenkonsiste membraro de la Organiza Komitato: Evelina Sokolova, Lena Ŝaravina, Sergeo Ĵilejkin, Alla Jaĥina, Sergeo Maksimov kaj mi — Vladimir Sapoĵnikov. La Organiza Komitato de NOVOJARSK-2019 konsistis el talentaj individuoj, kiuj, agante iniciateme, memstare kaj kolektive, estas kerno de la klubo. Mi fieras, ke havas eblecon kunlabori kun tiaj samideanoj!

Al NOVOJARSK-2019 venis 15 gastoj el 7 rusiaj urboj kaj 2 landoj. Estis reprezentantoj de Jegorjevsko kaj Odincovo (po 1, Moskva regiono), Tiĥvino (1, Lenigrada regiono), Ĉelabinsko (1), Novosibirsko (3), Tomsko (5), Kazahio (2, Ustj-Kamenogorsko), Belgio (1). Krasnojarskon prezentis 10 plenperiodaj aliĝintoj, 21 invititaj gastoj el





krasnojarska esperantistaro kaj ĉirkaŭ 15 neesperantistaj partoprenintoj de la apartaj aranĝoj. Ĝenerale NOVOJARSKon-2019 (plene aŭ laŭelekto) **partoprenis 60 personoj**. Inter ili **45 esperantistoj**.

La programo de NOVOJARSK-2019 estis plenumita sen ŝanĝoj, plene kaj bonkvalite. Okazis 23 planitaj aranĝoj: 2 publikaj aranĝoj en la regiona biblioteko, 8 prelegoj, 4 primovadaj diskutrondoj, 4 ekskursoj, 5 temaj vesperoj. Ĉiuvespernokte krom ludoj kaj kantoj okazis spontanaj diskutoj kaj konversacioj, kiuj faris grandan kontribuon por ellaboro de la decidoj kaj proponoj dum la NOVOJARSKa forumo.

En NOVOJARSK-2019 partoprenis plejparte sperta multjara aktivularo. Tial la aranĝo de la komencaj horoj ekfunkciis senbremse kaj bonkvalite. La antaŭvenintoj — Irina Goĉarova kaj Mikaelo Bronŝtejn tuj estis enigitaj en la popularigan E-agadon ĉe la regiona biblioteko. Irina prezentis Esperanton la 29-an de decembro laŭ la temo "Esperanto en du strofoj", kaj la 30-an okazis priliteratura konversacio kun Mikaelo, kiu konatigis la ĉeestantojn kun siaj prozaj kaj poeziaj verkoj en du lingvoj — la rusa kaj Esperanto.



La unuan programan tagon de la renkontiĝo kaj la lastan — de la forpasanta 2018-a jaro, la 31-an de decembro mastroj kaj gastoj okupis per akceptado, enloĝigado de la alveturantoj kaj prepariĝo al la novjara vespernokto. Neniu vantis kaj tumultis, ĉiu trovis sian lokon kaj okupon. Kaj jen apud la novjara tablo kolektiĝis 27 homoj: novosibirskanoj kaj tomskanoj, la eksterlandaj gastoj el Kazahio kaj Belgio, la foraj rusianoj el Odincovo, Tihvino kaj Ĉelabinsko. Post rapida konatiĝo aperis aŭtoritata Avo Frosto (Vladimir Sapojnikov) kun ĉarma Neĝulino (Lena Ŝaravina). Ili salutis la partoprenantojn, organizis interŝanĝon per donacetoj, startigis amuzan novjaran kvizon, preparitan de Alla Jaĥina, tostojn — kaj jen la Nova Jaro! Gratulo de Prezidento, batoj de la kremla turhorloĝo, tostoj, kuna vagado tra la distrikto — por admiri artfajraĵojn... Estis froste kaj gaje!

Ankaŭ la 1-a de januaro estis plenfesta. Vespere okazis brila koncerto de Mikaelo Bronŝtejn, kiun ĉeestis 35 geamikoj! Venis bonaj konatoj, samideanoj kaj multjaraj amikoj de Miĉjo: Marina Jepina kaj Elena Jerŝova, Sergeo kaj Tanjo Sosikin-oj, Eŭgeno Ĥabarov kun la filino Eva kaj Natajla Zaznobina kun la filino Tonja, Alona Temerova kaj Viktor Karev, Olga Bozina kaj Marina Bac, Alekseo kaj Ludmila Juravlov-oj kaj la aliaj. Spontane okazis koncerto post koncerto: la krasnojarskanoj kune kantis siajn ŝatatajn Esperanto-kantojn. La 3-an de decembro ili povus jam laŭprograme montri sin dum la "Barda rondo". La kantojn originalajn kaj tradukitajn plenumis Evelina kaj Alekseo, Mikaelo kaj Olga Bozina, Marina Bac kaj Segeo Ĵilejkin kaj ĉiuj ĉeestantoj ĥore!.. La 4-an de januaro festobunte pasis la adiaŭa vespero, dum kiu la homoj elpaŝis en nekutimaj por si roloj...



Malgraŭ la senteblaj frostoj, por ĉiu tago estis enprogramitaj eksteraj aranĝoj. Dum la ekskursoj partoprenantoj aktive konatiĝis kun la urbaj vidindaĵoj. Tage la 1-an de januaro 'NOVOJARSKanoj' vizitis la urban Novjaran abion sur la insulo Tatiŝev, la 2-an ni iris al la naturparko "Bobrovij Log", kie vizitis per kabla telfero Stolbi-rigardejon kaj la plej kuraĝaj (Katja Arbekova, Koĉjo Obrazcov kaj Ben Indestege) eĉ skiis malsupren de la monto! La saman vesperon 23 geesperantistoj okupaciis Teatron de Opero kaj Baletto por aŭskulti operon "Iolanta", kantis Evelina Sokolova. La 3-an de januaro homoj ĝuis busan ekskurson tra Krasnojarsko, kiun gvidis la plej bona urba ĉiĉeronino. Fermis la ekskursan maratonon la 4-an de januaro vizito al Domo-Muzeo de la fama rusa pentristo Vasilij Surikov.

Dum NOVOJARSK-2019 fakte formiĝis esperanto-universitato, kiu multe memorigis SEJT-ajn Somerajn Universitatojn. Okazis 8 diversstemaj prelegoj en Esperanto: "Aŭtora Esperanta kurso "Faru la Rondon!" de Irina Gonĉarova (Odincovo), "Linux Esperanto en komputila mondo" de Gennadij Basov (Tomsko), "Rakonto pri la ŝipa rondvojaĝo" de Katerina Apbekova (Novosibirsk), "Pri tradukado" de Mikaelo Bronŝtejn (Tihvino), "Politika seminario en Germanio" de Vladimir Minin (Tomsko), "Esperanto-filatelado kun prezento de la propra kolekto" de Maksim Fjodorov (Krasnojarsk), "Politika strukturo de Belgio" de Ben Indestege (Belgio), "Lingva festivalo" de Irina Gonĉarova. Ĉiuj prelegoj estis interesaj, vizitataj kaj pridiskutataj.

Problemoj de la Esperanto-movado en Rusio kaj en la regiono ankaŭ estis pridiskutataj dum du planitaj kunsidoj kaj dum la fermo. Al la renkontiĝo venis preskaŭ plenkonsiste spertaj esperantistoj, kiujn profunde tuŝis

problemoj de la movada evoluo. Pro tio la primovadaj diskutoj okazis ankaŭ ekster la programo, tage, nokte, ĉiam kaj ĉie la proponoj kaj ideoj estis abunde esprimataj. Reliefigis realaj decidoj kaj rekomendoj, kiuj ankoraŭ atendas konkludan rezolucion. Skize: temis pri ebloj organizi printempajn, somerajn kaj eĉ aŭtunajn regionajn renkontiĝojn, pli konkrete - OSER-50 en Tomsko jam en majo-2019, orientitan al novaj kursfinintoj. Ĉu venos tiuj novicoj al la renkontiĝo? Tio ĉi jam dependas de niaj komunaj penoj kaj aktivado surloke, en niaj urboj. La dua ideo estis pri sekvonta NOVOJARSK en Barnaulo – kun helpo de la loka Esperanto-klubo "Oazo". Ni esperas, ke Organizan Komitato de NOVOJARSK-2020 eniros membroj el ĉiuj siberiaj E-klubo. Komune organizante E-renkontiĝojn en aliaj siberiaj regionaj ĉefurboj — Kemerovo, Ĥabarovsko, Ĉitao, Irkutsko kaj la aliaj, ni povus plenumi popularigan mision en disvastigo de Esperanto kaj vigligo de la lokaj esperantistoj.

NOVOJARSK post kvar jaroj transformiĝis el distra komuna festado de Nova Jaro en diversflankan forumon de rusiaj esperantistoj. Jes, bonas, laŭ mi, la plena titolo por nia aranĝo: “Siberia regiona novjara renkontiĝo de rusiaj esperantistoj NOVOJARSK-2019”! Ni unuigu niajn dispolvitajn fortojn kaj homojn en la urboj kaj regionoj. Ni unuigu ĉirkaŭ nia tutlanda organizo — Rusia Esperantista Unio! Sen organizita movado Esperanto malaperos. Unuopuloj faros nenion. Nur per kolektivaj penoj ni povas atingi pozitivajn rezultojn.

Bonvenon al ĉiuj por NOVOJARSK-2020 en Barnulo!

Vladimir Sapojnikov

## Rezultoj de la laboro

Koran dankon!

La estraro de REU esprimas koran dankon al la iniciatintoj kaj organizintoj de la decembra “Poezia Marŝo” Raja

Kudrjavceva kaj Irina Gonĉarova.

La nova projekto tre bone marŝis tra la lando kaj vekis intereson pri E-poezio ne nur en E-klubo kaj grupoj, sed ankaŭ ĉe individuoj kaj en E-familioj.

Kvin la plej elstaraj partoprenintoj ricevis belajn Dankfoliojn kaj libropremiojn:

Volgograda E-klubo “Espero”

Tihina E-klubo

Dilara Gadirova el u. Tobolsko

Familio Vŝivceva el u. Miass

Franca E-grupeto el v. Querrien

Gratulojn al ĉiuj partoprenintoj kaj gajnintoj!

Imitinda kaj laŭdinda projekto! Novajn ideojn kaj sukcesojn al iniciatintoj!



Sv. Smetanina

Pli detalajn informojn pri la efektivigo kaj rezultoj de la projekto oni povas vidi en la paĝaro de REU:

<http://reu.ru/informoj/eo/270>

## Klubo de instruistoj

### Informletero

Al rusiaj Esperanto-kursgvidantoj, regionaj kunordigantoj de REU, estroj de esperantistaj kolektivoj  
Temo: Rezultoj de la Esperanta lernojararo “Julio 2018 – junio 2019”.

Estimataj gekolegoj!

En la pasintjara raporto, prezentita dum la instruista seminario de RET-2018 en Ŝujo, temis pri 21 kursoj A1-B2-nivelaj. Multaj opinias ĉi tiun nombron bona atingo. Sed nur konsiderante rezultojn de la nuna instrusezono, oni povas fari komparojn kaj konkludi pri la reala stato, tendencoj, evoluo / malevoluo de la instrua laboro en la lando.

La Estraro de REU alvokas ĉiujn kursgvidantojn raporti pri la okazigitaj kursoj, sendepende de la REU-membreco aŭ nemembreco de Esperanto-instruantoj. Ni kreu komunan tutecan bildon pri la instruado de Esperanto en Rusio.

La raporta periodo inkluzivas la monatojn ekde junio 2018, ĉar en la pasinta somera sezono okazis dumaranĝaj kursoj, kiuj ne jam eniris la lastan jarraporton pri la instruado.

Por verki vian raporton, bonvolu uzi la Tabelan demandaron. La plenigo de ĝi okupas tre malmultan tempon (nur kelkajn minutojn). Ĝi detale kaj koncize revuas kaj reflektas nombre kaj fakte la gviditan kurson. Bonvolu ne komuniki per leteroj longajn sed svagajn informojn pri viaj kursoj, ĉar letertekstoj apenaŭ povas krei deziratan imagon pri konkreta kurso kaj ĉar gravas precizaj datumoj uzablaj, kalkuleblaj kaj analizeblaj en la komuna statistika bazo. Apartaj leteroj, rakontoj, raportoj, mesaĝoj pri via Esperanto-instruado estas bonvene publikigitaj en “Bulteno de REU” en la rubriko “Klubo de instruistoj”.

La ĉi-jara Tabela demandaro esence konservas ĉiujn paragrafojn de la pasintjara dokumento krom la aldonita punkto pri pagataj / nepagataj kursoj, kiun rekomendis la instruista seminario de RET-2018.

La nuna reala situacio objektive ne pledas por kursogrupoj kun multaj kursfinintoj, des pli nun ĉiam pli ofte estas gvidataj retaj kursoj, kiuj pro specifaj konvencioj eksplicite alcelas individuajn instruadon. Informoj estas akceptataj do pri ĉiuj tipoj de okazigitaj kursoj, posedantaj ĉiajn rezultojn, eĉ plej minimumajn.

En ĉi tiu jaro la Estraro de REU pretas daŭrigi la lanĉitan tradicion proklami Eminentan rusian Esperanto- instruiston kaj instigas ĉiun aktivan kursgvidanton iĝi nomumita kandidato por la honora titolo pro gravaj atingoj kaj sukcesoj en la instruado de Esperanto. Bonvolu legi la koncernen regularon en “Bulteno de REU”, № 100, decembro 2018, paĝoj 2 -3.

Komence de la jaro 2019 mi deziras al ĉiuj rusiaj instruantoj de Esperanto multajn sukcesojn, kapablajn kaj scivolemajn kursanojn!

Vladimir Opletajev, estrarano de REU  
Januaro 2019



## Esperanto-instruistoj de Rusio Anatolij Ivanoviĉ Masenko



Naskiĝdato: **24 novembro 1937.**  
Jaro de esperantistiĝo: **1957.**  
Loĝloko: **Kislovodsko.**  
Profesio: **emeritiĝinta instruisto pri matematiko.**  
Instruista kvalifiko: **supera klero, diplomita instruisto.**  
La gepatra lingvo: **la rusa.**  
Studitaj fremdaj lingvoj: **la germana.**  
Preferataj aŭ plejofte aplikataj instrumentoj en la


kursoj de Esperanto: **buŝa, skriba metodoj.**

Esperantlingva kvalifiko: **trejnita Esperanto-instruisto; ILEI-ekzameno pri la lingvokono, Finnlando, 1995.**

Instruspertoj: **lernejaj rondetoj, diversnivelaĵaj dumarangaj kursoj, aŭtoro de Esperanto-lernolibroj kaj kursoj.**

Instruista kredo: **ripetado estas plej bona lernado.**

Ŝatata aforismo: **instrui ripozante, ripozi instruante.**



Mi estas 80-jara blinda emeritulo, eksinstruisto pri matematiko, kiu pli ol 40 jarojn laboris en la mezlernejo por nevidantaj infanoj. Dum dudek jaroj (1977-1997) kunlabore kun mia koleginino Anastasija Ivanovna Ĵukova mi gvidis la lernejan Esperanto-rondeton kun tre varia kaj interesa programo. Tiam estiĝis mia fruktodona kunlaboro kun la ruslingva revuo por blindaj gelernantoj "Советский школьник" (nun "Школьный вестник"), kiu feliĉe ĝis nun daŭras. Dum 1979 – 1981 en la revuo aperis la ellaborita de mi 20-lesiona kurso de Esperanto, poste sekvis la regula rubriko "Практикум эсперантиста", kiu daŭras ĝis nun sed ne tiel vigle. En 1987 la eldonejo "Просвещение" aperigis brajle (punktskribe) mian lernolibron "20 уроков языка эсперанто". Tiam inter miaj sortofratoj naskiĝis aro da fervoraj adeptoj de la internacia lingvo, kaj dum la 80-aj – 90-aj jaroj ni agis vere fruktodone (Esperantistaj renkontiĝoj, konferencoj, publikaĵoj ktp). Tio mankas, bedaŭrinde, nun: la malnova generacio forpasas, junularo praktike ne aperas. Restis nur niaj ĉiusomeraj t. n. ĵamboreoj, kiujn ni dum lastaj jaroj kutimas aranĝi ĉe marbordo por kunigi utilajn Esperantajn aranĝojn kun la agrabla ripozo. Kelkaj niaj aktivuloj (Nikolaj Solomencev, Vjaĉeslav Suslov, Valentina Kudinova) instruas Esperanton en la voĉbabelejoj, sed ankaŭ tie mankas junularo.

Aŭtune de 1956, kiam mi estis finanta lastan klason de la mezlernejo en Kislovodsko, hazarde en brajla ruslingva periodaĵo mi tralegis artikolon titolitan "La lingvo de la paco kaj amikeco". Ĝi tuj kaptis mian atenton, ĉar la devige instruata fremda lingvo (germana) interesis min, kaj mi montris evidentajn sukcesojn. Ankaŭ aŭtoro de la artikolo P. V. Gorĉakov estis persone konata al mi kiel bona ŝakisto en Leningrado, ĉar ni kelkfoje ŝakludis en la samaj konkursoj. Do, kiam ni denove renkontiĝis somere de 1957, tuj mi petis lin pli detale rakonti pri Esperanto kaj helpi min por eklerni la lingvon. Pjotr Vasiljeviĉ klarigis, ke, bedaŭrinde, mankas la lernolibro en brajlo, ankaŭ vortaro, sed li konsentis instrui iom post iom perletere. Tiel estiĝis nia longjara amikeco. Krome, li konatigis min kun alia blinda esperantisto Jan Krejĉa el Prago, kiu bone scipovis la rusan, kaj ankaŭ li ekzercis min pri Esperanto. Li sendis al mi malnovajn Esperantajn revuojn, kiujn mi legis kun intereso, kvankam tie abundis amaso da nekonataj vortoj. Tiutempe mi jam estis studento de la pedagogia instituto en Stavropolo, kaj mia eksterlanda korespondado mirigis miajn kamaradojn. Feliĉe moskva eldonejo "Просвещение" publikigis brajle en 1959 la broŝuron de Andrejev kaj en 1964 eĉ "Основы Эсперанто" de I. V. Sergejev, kio grave plivastigis mian Esperantan vortprovizon.

En 1962 mi revenis Kislovodskon kaj eklaboris en mia lernejo kiel instruisto pri matematiko. Gravan impulson por mi ludis la renkontiĝo kun profesoro E. A. Bokarjov. En februaro 1963 li ripozis en Kislovodsko, kaj unu mia konata blinda masaĝisto lin masaĝis. Dum la kuracado la profesoro ŝatis rakonti ion, ankaŭ pri Esperanto. La masaĝisto ne preterlasis mencii, ke ankaŭ ĉi tie unu



blinda strangulo okupiĝas pri tio, kaj Eŭgeno Aleksejeviĉ tuj ekdeziris renkontiĝi kun mi. Imagu, tiu neforgesebla renkonto daŭris preskaŭ kvar horojn! La profesoro multon rakontis pri esperantista movado, pri V. Eroŝenko kaj kontaktigis min kun kelkaj vidantaj samideanoj en Kislovodsko. Kiel ĉiam, mi havis pli ol 200 nekonatajn Esperanto-radikojn, kaj li pacience diktis al mi la tradukojn. Interalie, interesan kuriozaĵon mi spertis. Inter la radikoj mi nomis ankaŭ "stiĉon", kaj la profesoro diris, ke ĝin li ne konas. Poste, pripensinte, li demandis: "Eble superstiĉo?" Mi diris: "Jes, jes! Sed la prepozicion "super" mi ja konas, mi ne konas nur la stiĉon". Poste mi kaj Eŭgeno Aleksejeviĉ eĉ interŝanĝis kelkajn leterojn, kaj tute hazarda nia lasta renkontiĝo okazis en UK-kongresejo (Budapeŝto, 1966). Interalie, li estis naskita en Stavropola teritorio en la vilaĝo Peŝĉanaja balka.

Mi konatiĝis kun lokaj vidantaj samideanoj N. Ja. Tupijanc, S. S. Isajev, S. I. Kuznecov, ili helpis al mi legi nigrajn esperantajojn. Kreskis mia aliurba korespondado: V.N. Seriševa, G.A. Zaletov, M.M. Aderkass, V.I. Bepalov, M.S. Abolskaja kaj multaj aliaj. Ekstis viglaj kontaktoj kun la klubo "Internacia Amikeco" por blindaj esperantistoj en Riga. Dum 1963-1968 mi aperigadis la manskriban brajlan bultenon "Porblindula Informilo", ĉirkaŭ kiu grupiĝis la aktivuloj eĉ el kelkaj respublikoj. Dum la 70 – 80-aj jaroj inter ni stafetmaniere frekventis la sonrevuo "Amika Rondo". Komenciĝis miaj multnombraj vojaĝoj tra la lando kaj al eksterlandoj, gastaj interŝanĝoj, BET-oj, kongresoj. Inter 1966-2018 mi partoprenis en 27 IKBE-oj (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj), kiuj ofte koincidis kun UK-oj.

En marto de 1979 mi kaj V.S. Sedov partoprenis la Fondan konferencon de ASE, kaj rezulte aperis la sekcio de blindaj esperantistoj, kiun samtempe estris ASE kaj VOS (Tutrusia Blindul-Asocio). En la sekcion eniris ankaŭ reprezentantoj de kelkaj aliaj respublikoj (Ukrainio, Moldavio, Latvio, Litovio, Taĝikio). Disvolviĝis la eldona agado en brajlo: aperis Esperanto-rusa vortaro de Bokarjov, mia lernolibro de Esperanto kaj aliaj beletraĵoj. Ĉiujare okazis Esperanto-renkontiĝoj, seminarioj, konferencoj. Ekzemple, en 1989 en Kujbiŝev (Samaro) estis organizita renkontiĝo, kiun partoprenis gelernantoj el ses blindulleernejoj de Rusio, Moldavio kaj Taĝikio. Nia grupo unuafoje jam oficiale ĉeestis la jubilean Esperanto-Kongreson en Varsovio en 1987, kaj entuziasmigita ni eĉ ekkuraĝis okazigi la 60-an IKBE en Kislovodsko en 1994.

Tamen post disfalo de Sovetunio la sekcio ĉesigis sian agadon, do aperis bezono havi propran Esperanto-organizaĵon. La iniciata grupo (B. Zozulja, M. Ŝĉerbinin, A. Masenko) preparis la statuton, kiun en 1993 aprobis la fonda konferenco de REAN (Rusia Esperanto-Asocio de Nevidantoj); en 1995 ĝi estis registrita en la Justicministerio de Rusio. En 2008 mi transdonis la prezidantecon de REAN al pli juna aganto Pavel Rjabov. Dum lastaj jaroj ni spertis gravajn ĝenojn pro la amasiĝintaj raportoj (ofte tute malplenaj!) al diversaj instancoj, tial ni decidis malregistriĝi en la ministerio kaj plu agi neregistrite. Dum 1995-2017 mi estis estrarano de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj), dum la jaroj 2013-2017 eĉ ĝia prezidanto. Dum la pasintjara kongreso en Zagrebo oni nomumis min Honora prezidanto de LIBE, do laŭpove mi klopodas daŭrigi mian aktivecon.

*Anatolo Masenko,  
Kislovodsko, januaro 2019*

## Bibliografio

### Katalogo de rusiaj Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusio ekde 1957

La tria parto, la antaŭaj partoj aperis en BdR n-roj 99 kaj 100

N <sup>o</sup>	Aŭtoro	Titolo	Eldonejo, urbo	Eldon- jaro	Eldon- kvanto	Nombro de paĝoj	Mallonga referenca noto	Bitversio, reta ligilo
21	Н.Л. Гудсков (Николай Львович Гудсков)	«Факты и краткие сведения об эсперанто» ISBN 5-7161-0077- 5	РосЭ – “Impeto”, Moskvo	2000	500	104	Faktoj kaj mallongaj sciigoj pri Esperanto en la rusa lingvo. Informoj por ĉiuj interesiĝantoj. La dua parto entenas gramatikan informilon, Esperantan – rusan kaj rusan – Esperantan vortaretojn.	
22	Н.Л. Гудсков (Николай Львович Гудсков)	«Факты и краткие сведения об эсперанто» ISBN: 5-7161- 0081-3.	РосЭ – “Impeto”, Moskvo	2001	1000	104	Faktoj kaj mallongaj sciigoj pri Esperanto en la rusa lingvo. Informoj por ĉiuj interesiĝantoj. La dua parto entenas gramatikan informilon, Esperantan – rusan kaj rusan – Esperantan vortaretojn.	

23	Nikolao Gudskov (Николай Львович Гудсков)	"Epitomo de esperantologio"	REU - "Impeto", Moskvo	2002	300	152	Bazaj sistemigitaj faktoj pri Esperanto, Esperanta kulturo kaj esperantista movado kun dokumentaj suplementoj kaj ampleksa indekso pri personoj. La IX-a ĉapitro temas pri instruado de Esperanto. La libro estas destinita al dezirantoj preparigi al B-kaj C-nivelaj ekzamenoj.
24	Н.Л. Гудсков (Николай Львович Гудсков)	"Страна Эсперантия. Карманная энциклопедия" ISBN 5-17-038545-5 5-478-00359-X	Издательство АСТ-"Восток-Запад", (серия "Реальные самоучители иностранных языков") Москва	2006	2000	160	Ruslingva informilo pri Esperanto kaj la esperantista movado.
25	Н.Л. Гудсков (Николай Львович Гудсков)	"Элементарная грамматика языка эсперанто" ISBN 5-17-038543-9	Издательство АСТ-"Восток-Запад", (серия "Реальные самоучители иностранных языков") Москва	2006	2000	92	Ruslingva konciza gramatiko de Esperanto por tiuj, kiuj volas informiĝi pri gramatikaj bazoj de la internacia lingvo.
26	Н.Л. Гудсков (Николай Львович Гудсков)	"500 самых важных слов языка эсперанто" ISBN 5-17-038544-7	Издательство АСТ-"Восток-Запад", (серия "Реальные самоучители иностранных языков") Москва	2006	2000	32	
27	Николай Гудсков (Николай Львович Гудсков)	Учебный словарь начинающего эсперантиста.	REU, Uljanovsk	2001	100	48	
28	Anatolij Ivanoviĉ Masenko	"20 уроков языка эсперанто"	Издательство "Просвещение", Москва	1987	445	160 brajlaj paĝoj	20-leciona baza kurso de Esperanto, eldonita brajle (punktskribe) por blinduloj, dezirantaj lerni la lingvon.
29	Anatolij Ivanoviĉ Masenko	«Изучайте эсперанто»	Ruslingva revuo por blindaj gelnantoj "Советский школьник" (nun "Школьный вестник"), Moskvo	1979 - 1981	Jara eldonkvanto: 6000 ekz., en 2019: 400 ekz.	Entute: 180 paĝoj	20-leciona baza kurso de Esperanto, eldonita brajle (punktskribe) por blindaj gelnantoj, dezirantaj lerni la lingvon. La kurso estas kontinue ĝisdatigata per la konstanta aŭtora rubriko "Практикум эсперантиста" (1981 - 2019).



30	Андреев Н.Д. (Николай Дмитриевич Андреев)	«Международный вспомогательный язык эсперанто. Краткая грамматика и словарь-минимум»	Издательство "Просвещение", Москва	1959	-	Unu brajla volumo	Ruslingva informilo pri Esperanto kun konciza gramatiko kaj vortareto, eldonita brajle (punktskribe) por blinduloj, dezirantaj lerni la lingvon.
32	И.В. Сергеев (Иван Владимирович Сергеев)	«Основы эсперанто»	Издательство "Просвещение", Москва	1964	-	Tri brajlaj volumoj	Gramatika informilo pri Esperanto en la rusa lingvo kaj suplemento kun tekstoj, Esperanta - rusa kaj rusa - Esperanta vortaretoj, eldonita brajle (punktskribe) por blinduloj, dezirantaj lerni la lingvon.

Por ĉi tiu parto de la katalogo (21– 32) kunlaboris Nikolaj Gudskov, Anatolo Masenko, Vladimir Opletajev.

## Regiona agado

### Pri Boris Sokolov (14.02.1909 – 13.02.2002) en ruslingva informilo



Boris Fjodoroviĉ Sokolov

La 17an de januaro 2019 la sudurala reta informagentejo LENTACHEL.RU publikigis ruslingvan artikolon de Vjaĉeslav Rojdestvenskij, dediĉitan al la 110a naskiĝdatreveno de ĉelabinska sciencisto, pedagogo, kleriganto Boris Fjodoroviĉ Sokolov. Boris Sokolov estis elstara sciencisto, erudiciulo kun multaj talentoj, sed lia ne malpli grava ŝatokupo, kiu ruĝfadenis tra lia tuta vivo, estis ankaŭ Esperanto. Preskaŭ ĉiuj nunaj veteranoj-esperantistoj de Ĉelabinsko estas liaj lernantoj aŭ viclernantoj de sekva generacio. Sed mem Sokolov lernis Esperanton memstare, uzante lernolibrojn de la patro. Boris Fjodoroviĉ

multon ŝuldis, ankaŭ lingvajn kapablojn, al sia patro Fjodor Ivanoviĉ Sokolov – provinca telegrafisto, klera kaj muzikema homo, unu el pioniroj de la esperantista movado en Uralo.



Fjodor Ivanoviĉ Sokolov

Sian unuan duonvivan Boris Sokolov estis esperantisto-solulo, li ne korespondis internacie nek



REVU, Ĉelabinsko, 1984. Foto de Nikolaj Terentjev

membris en iu esperantista societo. Boris Fjodoroviĉ nenion sciis pri la pereado de gvidantoj de SEU en 1938, sed li konjektis, ke la ŝatata de li internacia lingvo ne spertis favoron en la lando de la venkinta proleta internaciismo. Des pli kian grandan ĝojon li ĝuis, kiam en 1957 li povis aŭskulti raportojn pri la Tutmonda festivalo de junularo kaj studentaro: unuafoje post dudek jaroj da forgeso la Moskva radio disaŭdigis vivan paroladon en la Lingvo Internacia. Ekde tiu jaro Boris Sokolov iĝis senlaca propagandanto kaj peranto de Esperanto. Danke al liaj klopodoj ĉe ĉelabinska instituto ĈIMESH, en kiu li profesoris, fondiĝis Klubo de internacia amikeco, kreinta vastan reton de korespondligoj kun amikoj el multaj landoj de la mondo. Pli poste la studenta klubo iĝis membro de Sovetia – Kuba amikeco.

La artikolon de Vjaĉeslav Rojdestvenskij vi povas legi ĉe <https://lentachel.ru/news/2019/01/17/110-let-ispolnitsya-ĉelyabinskomu-uchenomu-borisu-sokolovu.html>

Vladimir Opletajev

**APERo-13**  
**07 - 10.03.2019, Zvenigorodo**  
**Kredoj kaj miskredoj**

**INFORMLETERO № 1**

Ĉu la 13-a APERo? Tion indas celebri, ĉu ne? Venu — kaj vi estos surprizitaj! Ni malkovros niajn *kredojn kaj miskredojn!*



Kaj *frakaso tradiciojn!*

APERo-13 okazos en **ne kutima tempo** kaj en **nova loko!**

APERo-13 **akceptos** komencantojn kaj eĉ **startulojn** — kuraĝe alfrontante la netuŝeblan fundamenton de la aranĝo — la **Lingvan Disciplinon!** La unuan fojon en la historio de APERoj ene de la renkontiĝo pasos la baza parola Esperanto-kurso "**Faru la Rondon!**" por startuloj, komencantoj kaj aŭtodidaktaj! Kiel **asistantoj** ĝin rajtas partopreni instruantoj de Esperanto kaj interesiĝantoj pri aŭtoraj instrumanieroj.

Ne

preterlasu!!! **Aliĝilo:** <https://goo.gl/forms/ILIOFegjaVCzfTH63>

**TEMO: Kredoj kaj miskredoj.**

Superstiĉoj kaj koŝmaroj, zombioj kaj fantomoj, klarvidkapablo kaj supersenteco, spiritismo, paranormalaj fenomenoj, mistifikaĵoj kaj tiel plu kaj tiel plu — ni pridiskutu tiujn tiklajn temojn por kompreni, kion opinias pri tio ni mem kaj la scienco.

**PROGRAMO**

Kutimaj APERaj programeroj, certe, denove plezurigos la ŝatantojn: Tradukista Konkurso kun Larisa kaj Tanjo, debatoj kun Alisa, diskutrondoj kun IljaS, teatraĵoj kun Iranta, Poezia Horo kun Mirina, "Kio? Kie? Kiam?" kun Peĉjo, intervjuado por "Esperanto — la unua kanalo" far' de Karter, distraĵoj kaj koncerto de Miĉjo Povirin, kantaj vesperoj kaj koncerto de Sergeo La Terura, tablaĵ ludoj kaj "Homlupoj" — nu, kaj ĉio, per kio vi mem kontribuos la programon, vi, karaj kaj kreemaj partoprenantoj! Kolektu viajn privatajn rakontojn! Proponu ajnajn formojn de la sinesprimo kaj ninesprimigo! Taŭgas ĉio: prelegoj, mistifikaĵoj, debatoj, kvizoj, konkursoj, skeĉoj... Ĉiiiiiooooo!

Proponojn por la programo bonvolu sendi al Mirina: [mirinda.strigo@gmail.com](mailto:mirinda.strigo@gmail.com) aŭ skribu en la VK-grupo de

APERo [https://vk.com/topic-36862024\\_39258072](https://vk.com/topic-36862024_39258072)

**TAGORDO**

Alveno: 07.03.2019 je la 17:00

Forveturo: 10.03.2019 je la 15:00

Matenmanĝo: 9:00-10:00 Tagmanĝo: 14:00-15:00 Vespermanĝo: 19:00-20:00

**LOKO**

**Adreso:** Московская область, город Звенигород, Верхний Посад, Пансионат «Солнечный». <http://www.best-sanatoriy.ru/catalog/1773/>

**Vojo:** de Belorusa stacidomo (aŭ de metrostacioj "Begovaja", "Fili") per elektrotrajno derekten Moskvo-Golicino-Zvenigorodo — ĝis la stacio «Звенигород» (la fina), plu per unu el aŭtobusoj №24, 28 ĝis la haltejo «4 км». Laŭ la montrilo:

«Верхний Посад 1,5 км» turnu vin dekstren kaj piediri ĝis la pensiono «Солнечный».

Per aŭtomobilo: laŭ Moĵajska, Rublovska ŝoseoj, МКАД, Novoriga ŝoseo 48 km, turno al Zvenigorodo, laŭ la montrilo «Верхний Посад 1,5 км» ĝis la pensiono «Солнечный».

**VIVKONDIĈOJ**

**Loĝado:** 2-3-lita ĉambro (duŝejo kaj necesejo en la apartamento)

**Manĝado:** 3-foje tage, en samdoma manĝejo

Senpage uzebblas baseno kaj sporta trejnadejo (ĉio — po 1 horo tage).

Bela naturo ĉe bordo de Moskvo-rivero.

**PREZOJ kaj PAGMANIEROJ**

Aliĝkotizo (redonebla ĉe neveno), pagenda ĝis la 01.03.2019 — 600 rub

Antaŭpago (ne redonebla ĉe neveno), pagenda ĝis la 01.03.2019 — 500 rub

Loĝado (po 2-3 homoj en ĉambro) kaj manĝado (3-foje tage) por tuta periodo — 5100 rub

**Sume: 5700 rub.** Ĉio!

Loĝado (po 2-3 homoj en ĉambro) kaj manĝado (3-foje tage) por unu tago — 1700 rub

Infanoj ĝis 3 jaraĝaj — senpage.

Eblas laŭdezire sendi pli da antaŭpaga mono pro loĝado-manĝado (ĉe neveno tiu mono redoneblas).

La mono por loĝado-manĝado pagendas surloke, en la bazejo, nur en la manojn de Karter, dum la registrado ĉe la alveno.

La monon — 1100 rbl (500+600) aŭ pli eblas ĝiri al la banka karto de Sberbank:

**4276 3800 7508 0668**

Post la ĝiro NEPRE skribu retroŝte al [amikko@yandex.ru](mailto:amikko@yandex.ru) aŭ en VK al <https://vk.com/amikko>, ke vi ĝiris la monon, kiam vi ĝiris, kiom da kaj ke tio estas por APERo.

**Novaĵojn** pri APERo-13 vidu en [https://vk.com/apero\\_ek\\_masi](https://vk.com/apero_ek_masi)

**Al viaj demandoj respondos:**

Mirina (Irina Gončarova) +7(905)796-6199

[mirinda.strigo@gmail.com](mailto:mirinda.strigo@gmail.com), [https://vk.com/mirinda\\_strigo](https://vk.com/mirinda_strigo),

Karter (Aleksandr Basov) +7(901)584-9604; +7(903)256-8873

[kilokaban@yandex.ru](mailto:kilokaban@yandex.ru), <https://vk.com/kilokaban>.

Bonvenon, karaj! Invitu komencantojn! **Aliĝilo:** <https://goo.gl/forms/ILIOFegjaVCzfTH63>

Senpacience kaj malfermanime atendas vian aliĝon kaj venon la organizantoj —

**Moskva Esperanto-Asocio MASI!**



## TEMoj-2019

### Dua informilo

*Kara aliĝinto,*

*ni dankas vin por via aliĝo al TEM-oj bonorde registrita. Atendante vin en Tiĥvin ni zorgas prepari ĉion tiel, ke la aranĝo lasu nur bonajn rememorojn en via animo. Bonvolu nun ricevi kelkajn utilajn informojn.*

*La organiza teamo*

1. Se vi ankoraŭ ne pagis **LA ALIĜKOTIZON**, bonvolu pagi al la Sberbanka karto de Mikaelo Bronŝtejn. Ĉiujn aliajn pagojn vi faros ĉe la registriĝo tuj post via alveno. Alilandaj aliĝintoj pagu ankaŭ la kotizon ĉe la alveno.
2. Pri la ekskursoj :



La plimulto de la aliĝintoj elektis la tuttagan ekskurson al Staraja Ladoga, la antikva ĉefurbo de Rusio, kiu situas nur 100 km for de Tiĥvin. La ekskurso okazos per speciale mendita buso; starto post maternmanĝo, reveno al vespermanĝo. La ekskurso havos tagmanĝo-paŭzon dum la ekskurso. Proksimuma prezo de la ekskurso – 500 rub.

Du personoj mendis la ekskurson al Velikij Novgorod. Ĉiokaze ni provos kontentigi la deziron, organizante aŭtomobilan vojaĝon, sed por redukti la vojelspezojn estus bone trovi du pliajn dezirantojn.

Krom la tuttagaj okazos ankaŭ kelkaj enurbaj kaj apudurbaj ekskursoj, pri kiuj ni informos vin surloke.

3. Se vi hazarde forgesis indiki viajn programproponojn en la aliĝilo, aŭ ion inventis intertempe, bv. informi nin. **Via aktiva partopreno certe riĉigos la programon de TEMoj.**
4. Por la personoj, kiuj deziras loĝi en hoteloj de Tiĥvin, (aktuale 2 personoj) ni sendas liston de la plej vizitataj hotelrejtejoj (Suplemento1). Bonvolu elekti tiun, kiu estas la plej konvena por vi. Vi povas rezervi la loĝadon tie memstare per la reto, sed, se io ne funkcios, bv. informi nin – ni okupiĝos pri tio surloke.
5. Se vi venos en Sankt-Peterburgo, vi havas kelkajn eblecojn por atingi Tiĥvin:
  - per elektrotrajnoj de **Moskovskij stacidomo (metrostacio Ploščad Vosstaniija)**, kun unu trajnŝanĝo en Volĥovstroj. Uzeblas 4 trajnoj, kies alveno en Volĥovstroj bone kongruas kun la starto de la trajnoj al Tiĥvin.
  - Dume la somera horaro ne estas publikigita, bonvolu sekvi postajn informojn ĉe <http://temoj2019.online/>
  - **nur vendrede** funkcias rekta elektrotrajno Sankt-Peterburg – Tiĥvin, kiu startas de **Ladojskij stacidomo (metrostacio Ladojskaja)**. Ankaŭ por tiu la somera horaro dume estas nekonata.
  - per normalaj longdistancaj trajnoj, startantaj de **Ladojskij stacidomo (metrostacio Ladojskaja)**; ĉiuj havas halton en Tiĥvin. Estas la trajnoj, irantaj al Vologda, Ĉelabinsk, Jekaterinburg, Tjumenj, Astana, Vorkuta, Novokuzneck.
  - per busoj, startantaj de la **busstacio en Obvodnij kanal** (de la fervoja **Moskovskij stacidomo** la busstacio atingeblas per busoj 74, 76 – la 4-a haltejo « Avtovokzal ») Ankaŭ por la busoj oni ŝanĝos la horaron en majo – vidu poste ĉe <http://temoj2019.online/>
  - per busoj, startantaj de la fervoja stacidomo Ladojskij. La horaron vidu same ĉe <http://temoj2019.online/>

Daŭro de la trajnvojaĝo de Sankt-Peterburgo ĝis Tiĥvin estas 3,5 – 4 horoj. Biletprezoj por elektrotrajno – 560 rub, por longdistanca trajno – dependas de la vagono. Daŭro de la busvojaĝo – 3 – 4 horoj. Biletprezo – inter 400 kaj 450 rub.

La trajnveturontoj de Uralo, Siberio, Mezazio **ne devas veturi ĝis la fino, t.e. ĝis Sankt-Peterburgo.** Aĉetu bileton ĝis la stacio **Tiĥvin**, kie haltas ĉiuj ĉi-direktaj trajnoj.

6. Bonvolu anticipe informi nin pri la tempo de via veno al Tiĥvin kaj pri la trafikrimedo, per kiu vi venos. Ni nepre renkontos vin ĉe via trajno aŭ buso por faciligi vian iron al la TEMejo. Se vi ŝatus esti renkontata en Sankt-Peterburgo – sendu al ni la informojn pri via alveno – ni provos organizi la renkonton kaj informos vin pri la rezulto de niaj provoj.
7. Se iakaŭze vi ne estos renkontita en Tiĥvin, bv. noti, ke la TEMejo situas en vilaĝo Caricino Ozero, 7 km norden de la urbo kaj atingeblas de Ploščad Svobodij (2 bushaltoj de la stacidomoj per ajna urba buso) per la apudurba buso N-ro 155. Veninte al la Ploščad Svobodij, transiru ĝin al la bushaltejo, situanta ĉe la preĝejo. En Caricino Ozero, ĝuste kontraŭ la fina haltejo de la buso estas enirejo al la Bazejo de paraolimpikaj sportistoj (База паралимпийских спортсменов) – tio estas la TEMejo. Aktualan horaron de la busoj 155 ni kroĉas al la Informilo (Suplemento 2).
8. Kelkaj aliĝintoj antaŭ TEM-oj intencas partopreni en Baltaj Esperanto-Tagoj (BET) en Paneveĵis, Litovio inter la 7-a kaj la 14-a de julio. Oni senprobleme povas veni al la malfermo de TEM-oj, startante el Paneveĵis post la solena fermo de BET, la 14-an de julio. Inter Paneveĵis kaj Sankt-Peterburgo cirkulas busoj de kelkaj firmaoj. Vojaĝtempo – inter 14 kaj 18 horoj, la bileto kostas ĉ. 2500 rub. Pli komfortas veturi el Paneveĵis al Riga per buso (2 horoj) kaj poste de Riga al Sankt-Peterburgo per trajno, sed la biletprezo estos konsiderinde pli alta. La biletojn oni povas aĉeti rete. Ni rekomendas fari tion laŭeble pli frue.
9. Inter aktualaj aliĝintoj 7 personoj planas partopreni en la Universala Kongreso (UK), kiu okazos de la 20-a ĝis la 27-a de julio en Lahti, Finnlando. La urbo Lahti situas ĉ. 200 km for de Sankt-Peterburgo kaj estas facile atingebla per multaj trajnoj kaj busoj. La rapidtrajno “Allegro” startas al Lahti de la Finnlanda slacidomo en Sankt-Peterburgo kelkfoje ĉiutage kaj atingas la UK-urbon nur du horojn post la starto; la biletprezo estas ĉ. 1200 rub. Ankaŭ ĉi-okaze la biletoj aĉeteblas rete. Sabate, la 20-an de julio en la programo de UK estas nur registrado, enloĝigo kaj la Internacia Foiro. Se vi volas trafi al la UK frue, vi povas starti el Tiĥvin la 20-an de julio frumatene kaj preni la rapidtrajnon inter la 10-a kaj la 11-a horoj. Multas eblecoj atingi UK-on pli poste. Ĉiokaze, kiam vi estos certa pri la tempo de via forveturo el Tiĥvin, bonvolu informi nin – ni penos ĉiumaniere asisti vian komfortan veturon. Se la UK-partoprenontoj deziras foriri al UK grupe, ni povos mendi specialan buseton de Tiĥvin al Sankt-Peterburgo.
10. Se vi perdiĝis dumvoje, aŭ havas urĝajn demandojn, ne hezitu telefoni al **Mikaelo Bronŝtejn - +7 921 346 82 45**, aŭ al **Aleksandr Belov - +7 921 317 43 03**

Respondojn al viaj demandoj vi povas ricevi ankaŭ ĉe <http://temoj2019.online/>

## **BONVENON AL TIĤVIN !!!**



## NE PRETERLASU LA UNIKAN EBLECON!



Karaj geamikoj! Multaj el vi sukcese pasis la skriban parton de KER-ekzameno. Kelkaj pasis kompleksan ekzamenon en diversaj internaciaj E-aranĝoj, ankaŭ en Moskvo. Nun mi invitas vin kontroli kaj prui viajn parolkapablojn en la skajpa internacia ekzameno, kiu okazos en Moskvo la 7-an de aprilo 2019. Vi estos alparolataj kaj ekzamenataj skajpe de eksterlandaj esperantistoj-instruistoj. Tio estas unika okazo: sidante en Moskvo en komfortaj kondiĉoj (la loko estas trovita por la tuta grupo) paroli Esperante pri ajnaj temoj. Vi rajtas elekti la konvenan por vi nivelon, ĉu B1, B2 aŭ C1. Tute ne gravas, kiun skriban nivelon vi iam plenumis.

La registrado jam komenciĝis, limdato estas la 7-a de marto. Bonvolu turni vin pri la onta ekzameno al Svetlana Smetanina – la ĉefa organizanto ([svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)) aŭ Irina Gonĉarova – kunorganizanto ([mirinda.strigo@gmail.com](mailto:mirinda.strigo@gmail.com)).

La ŝanco estas unika! Rapidu kaj invitu viajn amikojn !!!

## *In memoriam*

### Forpasis Olga Kiselova

La 26-an de decembro 2018 forpasis esperantistino el Jaroslavlo Olga Kiselova. Ŝi naskiĝis la 19-an septembro 1968. Ŝi instruis Esperanton en sia urbo, partoprenis plurajn E-aranĝojn – i.a. elpaŝis dum SAT-kongreso en Moskvo 2000. Ŝi verkis muzikon por kelkaj poemoj. Ŝi verkis artikolon pri Sergej Rublov, aperintan en REGo n-ro 3, helpis kontakti lian filon Vadim (li loĝas en Jaroslavlo) por eldono de poemtradukoj el Puŝkin, kiu aperis en 2002. Ni kondolencas la proksimulojn kaj la tutar jaroslavlan esperantistaron.

*Estraro de REU*



---

**Bulteno de REU (BdR)** estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”  
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) aŭ (kaj) Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*